



Chapter 7

Vojaĝu kun Zam 11–20

(A basic course)

Introduction.....	2
Vojaĝo dek unu (11) - Bonvenon al Las-vegaso!	3
Vojaĝo 12 (dek du) - Bonvenon al Kaburbo!.....	4
Vojaĝo dek tri (13) - Bonvenon al Meksikurbo!.....	6
Vojaĝo dek kvar (14) - Bonvenon al Sankt-Peterburgo!.....	7
Vojaĝo dek kvin (15) - Bonvenon al Kusko!.....	9
Kvizo 3.....	10
Vojaĝo dek ses (16) - Bonvenon al Irkucko.....	11
Vojaĝo dek sep (17) - Bonvenon al Kioto!.....	12
Vojaĝo dek ok (18) - Bonvenon al Nuko!.....	14
Vojaĝo dek naŭ (19) - Bonvenon al Samarkando!.....	15
Vojaĝo dudek (20) - Bonvenon al Kiliminĝaro!.....	17
Kvizo 4.....	18
Respondoj de la ekzercoj kaj kvizoj.....	19

(**Vojaĝo** means “journey” or “trip”. **Bonvenon al** means “welcome to”.)

Introduction

In this course, you'll travel round the world and visit several cities with Zam. You'll learn a bit about various cities, cultures, and languages. In addition, you'll be able to practice reading in Esperanto and to learn some new words.

For each trip with Zam you'll find:

- some information and a picture of the city being visited
- a short text with translation about something linked to the city
- notes about the grammar and word usage in the text
- a translation exercise
- a fill-in-the-blanks exercise for the same text as above

Once you've made five journeys, there will be a quiz about them. You'll be asked questions about the cities, words, and grammar that you encounter in this course.

There are also MP3 files with recordings of the texts; you can find them at www.ikso.net/libera. We suggest that you listen to each file several times until you can easily understand all the words of the text.

This chapter will repeat some of the material from earlier chapters. But repetition is an essential part of learning a new language.

Bonan vojaĝon denove! (Have another good trip!)



Ĉi tiujn lokojn ni vizitos!
These are the places we'll be visiting!

Vojaĝo dek unu (11) – Bonvenon al Las-vegaso!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 1,2 milionoj.

Ĉefa lingvo: La angla.

Valuto: Usonaj dolaroj.

Rimarko: Pli ol 30 milionoj da vizitantoj jare.

More than 30 million visitors each year.

Lando: Usono.



Vort-listo

ambaŭ – both

amuza – amusing, funny, entertaining

atendi – to wait, to expect

eĉ – even

gajni – to gain, to earn, to win

havi – to have

kiam – as, when

koro – heart

mono – money

preskaŭ – nearly, almost

riĉa – rich, wealthy

tiom – that much

tre – very, quite, very much

Teksto kun traduko

Mi ofte gajnas monon, kiam mi estas en Las-vegaso.

I often win money when I'm in Las Vegas.

Sed amikino de mi, ŝi preskaŭ ĉiam malgajnas monon ĉi tie.

But a friend of mine, she almost always loses money here.

Ŝi havas koramikon kaj li kutime malgajnas eĉ pli da mono ol ŝi!

She has a boyfriend and he usually loses even more money than she does!

Sed ili ambaŭ estas tre riĉaj, do por ili ne tiom gravas.

But they're both very rich, so it's not such a big deal for them.

Tamen ni ĉiam bone amuziĝas en Las-vegaso.

However, we always have a good time in Las Vegas.

Mi esperas, ke ankaŭ vi ŝatos la urbon. Ĝi atendas vian monon!

I hope you'll like the city too. It awaits your money!



Notoj

mi, vi, ŝi, li, ĝi, ni, ili (I, you, she, he, it, we, they) are the so-called personal pronouns.

amuza – fun; **amuzi** – to amuse; **amuziĝi** – to have fun

Tradukekzerco

- | | |
|---|---------|
| 1) She lives in a large city. | = _____ |
| 2) Maybe we will come tomorrow. | = _____ |
| 3) They probably live in a beautiful house. | = _____ |
| 4) Today it works, very well! | = _____ |
| 5) Unfortunately, he became sick. | = _____ |
| 6) Also you are very welcome. | = _____ |

Plenigekzerco

Vortoj: havas, preskaŭ, amuziĝas, ofte, ambaŭ, atendas

Mi _____ gajnas monon, kiam mi estas en Las-vegaso. Sed amiko de mi, ŝi _____ ĉiam malgajnas monon ĉi tie. Ŝi _____ koramikon kaj li kutime malgajnas eĉ pli da mono ol ŝi! Sed ili _____ estas tre riĉaj, do por ili ne tiom gravas. Tamen ni ĉiam bone _____ en Las-vegaso. Mi esperas, ke ankaŭ vi ŝatos la urbon, ĝi _____ vian monon!

Vojaĝo 12 (dek du) – Bonvenon al Kaburbo!

- Loĝantoj:** Ĉirkaŭ 3 milionoj.
- Ĉefaj lingvoj:** La afrikansa, la angla, la zulua, la pedia, la ksosa, la sota, la cvana, la conga, la svazia, la matabela kaj la vendaa
- Rimarko:** Du maroj tie renkontiĝas.
- Valuto:** Sudafrikaj randoj.
- Lando:** Sudafriko.



Vort-listo

diversa – various, diverse, varied

feliĉa – happy

fino – end, ending

grupo – group

inter – between, among

libera – free

popolo – people, folk, nation

provi – to try, to attempt, to test

rajto – a right (to do something)

rilato – relation

sama – same

situacio – situation

teni – to hold, to hang on to

tio – that over there, that, those

Teksto kun traduko

Kaburbo havas diversan popolon.

Cape Town has a varied population

Hodiaŭ la diversaj grupoj havas bonan rilaton inter si.

Today the various groups have a good relationship with each other.

Sed antaŭ kelkdek jaroj ne ĉiuj grupoj havis samajn rajtojn.

But a few decades ago, not all groups had the same rights.

En 1948 blankuloj enkondukis apartismon.

In 1948, the whites introduced Apartheid.

Nelson Mandela kaj aliaj provis kontraŭlabori la apartismon.

Nelson Mandela and others tried to fight against Apartheid.

Pro tio la tiama registaro tenis ilin en malliberejo dum multaj jaroj.

For that the government at the time imprisoned them for many years.

Feliĉe ĉio pliboniĝis kaj en 1994 Mandela fariĝis prezidento.

Fortunately, things improved, and in 1994 Mandela became president.



Notoj

The ending **-n** indicates, among other things, the direct object. The direct object is the thing that is directly acted on by the verb; therefore, in the sentence “I eat an apple”, the apple is the direct object, since it is experiencing the action of the verb.

Tradukekzerco

I see the city. = _____
She has a beautiful car. = _____
Today we will visit a good friend. = _____
Tomorrow a good friend will visit us. = _____

Plenigekzerco

Vortoj: *feliĉe, tenis, inter, grupoj, provis, en, popolon*

Kaburbo havas diversan _____. Hodiaŭ la diversaj grupoj havas bonan rilaton _____ si. Sed antaŭ kelkdek jaroj ne ĉiuj _____ havis samajn rajtojn. _____ 1948 blankuloj enkondukis apartismon. Nelson Mandela kaj aliaj _____ kontraŭlabori la apartismon. Pro tio la tiama registaro _____ ilin en malliberejo dum multaj jaroj. _____ ĉio pliboniĝis kaj en 1994 Mandela fariĝis prezidento.

Vojaĝo dek tri (13) – Bonvenon al Meksikurbo!

Loĝantoj:	Ĉirkaŭ 25 milionoj.
Ĉefaj lingvoj:	La hispana.
Valuto:	Peso.
Rimarko:	Inter la 5 plej grandaj urboj de la mondo. <i>One of the 5 largest cities in the world.</i>
Lando:	Meksiko.



Vort-listo

deziri – to desire, to wish	infano – child
edzo – husband	paroli – to speak, to talk
familio – family	parto – part, share
frato – brother	preti – to be ready
gasti – to be a guest of, to stay with	renkonti – to meet, to encounter

Teksto kun traduko

En Meksikurbo loĝas mia familio grandparte.

Most of my family lives in Mexico City.

Miaj gefratoj kaj iliaj infanoj ĉiam pretas gastigi min.

My siblings and their children are always ready to put me up.

Ankaŭ la fratino de mi kaj ŝia edzo kaj lia frato parolas Esperanton.

My sister and her husband and his brother also speak Esperanto.

La 14-a de februaro estas festotago en Meksiko. Ĝia temo estas amo kaj amikeco.

The 14th of February is a holiday in Mexico. Its theme is love and friendship.

Estas bonega tago por renkonti onian familion.

It's a great day to meet your family.

Salutojn kaj bondezirojn al via familio!

Greetings and good wishes to your family!



Notoj

mia, via, ŝia, lia, ĝia, nia, ilia (my, your, her, his, its, our, their) are the so-called possessive pronouns.

The word **oni** is a pronoun that indicates people in general; it can be translated as **one**, or as “someone”, “you”, etc. The Esperanto sentence **Oni neniam scias** can therefore be translated as “One never knows”, or as “You never know”. **Oni** behaves grammatically like all other pronouns.

Tradukekzerco

- | | |
|-------------------------------------|---------|
| 1) That dog is his. | = _____ |
| 2) I am her friend. | = _____ |
| 3) Our car doesn't work. | = _____ |
| 4) Their cat disappeared yesterday. | = _____ |

Plenigekzerco

Vortoj: familio, kaj, renkonti, parolas, infanoj, al

En Meksikurbo loĝas mia _____ grandparte. Miaj gefratoj kaj iliaj _____ ĉiam pretas gastigi min. Ankaŭ la fratino de mi kaj ŝia edzo kaj lia frato _____ Esperanton. La 14-a de februaro estas festotago en Meksiko. Ĝia temo estas amo _____ amikeco. Estas bonega tago por _____ sian familion. Salutojn kaj bondezirojn via familio!

Vojaĝo dek kvar (14) – Bonvenon al Sankt-Peterburgo!

- | | |
|-----------------------|--|
| Loĝantoj: | Ĉirkaŭ 5 milionoj. |
| Ĉefaj lingvoj: | La rusa. |
| Valuto: | Rubloj. |
| Rimarko: | Fondita en 1703 de caro Petro I,
laŭ modelo de nederlandaj urboj.
<i>Founded in 1703 by Czar Peter I,
following the model of Dutch cities.</i> |
| Lando: | Rusio. |



Vort-listo

- | | |
|--|------------------------------|
| atenti – to pay attention | pardon – to pardon |
| eble – possibly, maybe | rapida – rapid, quick |
| frapi – to hit, to strike, to score | ridi – to laugh |
| frazo – phrase | se – if |
| ĝusta – correct | simila – similar |
| kazo – affair, matter, situation | ŝerci – to joke |
| lerni – to learn | tiel – in that way |
| lingvo – language | |

Teksto kun traduko

En Sankt-Peterburgo ni vizitu mian bonan amikon Slavik.

Let's visit my good friend Slavik in St. Petersburg.

Lia filozofio kaj frapfrazo estas: "Esperu ĉiam!"

His philosophy and catchphrase is: "Always hope!"

Se mi loĝus en Rusio, ankaŭ mi havus similan frapfrazon.

If I lived in Russia too, I'd have a similar catchphrase.

Pardonu min! Mi nur ŝercis. Eble bonus, se mi estus pli atenta pri miaj ŝercoj.

Sorry! I was only joking. Maybe it would be good if I paid more attention to my jokes.

Ĉiukaze, mia frapfrazo estas: "Ridetu kaj lernu!"

In any case, my motto is: "Smile and learn!"

Estus bone, se vi farus ĝuste tion, ĉar tiel oni lernas lingvon pli rapide.

It would be good if you did just that, because you learn a language faster that way.



Notoj

The ending **-us** is used for verbs in the conditional form.

For example: **estus** (would be) and **farus** (would do).

The ending **-u** is used for verbs in forms of commands, desires, and requests.

For example: **estu bona** (be good) and **pardonu min** (pardon me).

Tradukekzerco

Pardon me, I completely forgot that.

= _____

It would be very good if she comes.

= _____

Give the book to me, please.

= _____

Come immediately!

= _____

If I only had money...

= _____

Plenigekzerco

Vortoj: *mian, estas, atenta, tiel, ŝercis, mia, similan*

En Sankt-Peterburgo ni vizitu _____ bonan amikon Slavik. Lia filozofio kaj frapfrazo _____ :
"Esperu ĉiam!" Se mi loĝus en Rusio, ankaŭ mi havus _____ frapfrazon. Pardonu min! Mi nur
_____. Eble bonus, se mi estus pli _____ pri miaj ŝercoj. Ĉiukaze, _____ frapfrazo estas:
"Ridetu kaj lernu!" Estus bone, se vi farus ĝuste tion, ĉar _____ oni lernas lingvon pli rapide.

Vojaĝo dek kvin (15) – Bonvenon al Kusko!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 300 mil.
Ĉefa lingvo: La hispana kaj la keĉua.
Valuto: Nova Solo.
Rimarko: Unu el plej malnovaj urboj de la kontinento. /
One of the oldest cities of the continent.
Lando: Peruo.



Vort-listo

ekzisti – to exist

fama – famous

ĝis – until

post – behind, after

proksima – nearby, close, next, near

signifi – to imply, to mean, to signify

tempo – time, while

ulo – fellow, person, –er [person], guy, chap

Teksto kun traduko

La nomo Kusko en la keĉua signifas “umbiliko de la mondo”.

The name Cuzco in Quechua means “navel of the world”.

La keĉua estas la lingvo de la inkaoj.

Quechua is the language of the Incas.

La imperio inkaa ekzistis ekde 1200 (mil ducent) ĝis 1533 (mil kvincent tridek tri).

The Inca Empire existed from 1200 until 1533.

Nuntempe la plejparto de la loĝantoj de Kusko estas indianoj, posteuloj de la inkaa imperio.


Nowadays, most of the inhabitants of Cuzco are Indians, descendants of the Inca Empire.

La alteco de Kusko estas ĉirkaŭ 3 400 metroj.

The elevation of Cuzco is about 3,400 metres.

Proksime de Kusko troviĝas ankaŭ alia fama urbo de la inkaoj, Maĉu-Pikĉuo.

Near Cuzco you can find another famous city of the Incas, Machu Picchu.



Notoj

The word **de** is used, among other things, to express possession or a starting point in time or space. For example, possession is expressed like this: **la lingvo de inkaoj** (the language of the Incas).

The word **indiano** means “Indian” in the sense of a Native American, and applies to all native peoples in the Americas. In Esperanto, there is no confusion with people who come from India –

who are called **baratanoj** or **hindianoj**.

Tradukekzerco

- | | |
|---|---------|
| 1) According to me, it is a very good idea. | = _____ |
| 2) His friends laughed a lot. | = _____ |
| 3) She flew from Beijing. | = _____ |
| 4) He will travel by train. | = _____ |
| 5) The book of life is very interesting. | = _____ |

Plenigekzerco

Vortoj: estas, alia, plejparto, de, signifas, ekzistis

La nomo Kusko en la keĉua _____ “umbiliko de la mondo”. La keĉua estas la lingvo _____ la inkaoj. La imperio inkaa _____ ekde 1200 (mil ducent) ĝis 1533 (mil kvincent tridek tri). Nuntempe la _____ de la loĝantoj de Kusko estas indianoj, posteuloj de la inkaa imperio. La alteco de Kusko _____ ĉirkaŭ 3 400 metroj. Proksime de Kusko troviĝas ankaŭ fama urbo de la inkaoj, Maĉu-Pikĉuo.

Kvizo 3

- La frapfrazo de mia rusa amiko Slavik estas:
A) Esperu ĉiam! **B)** Esperus ĉiam! **C)** Malesperu ĉiam!
- En kiu urbo estas facile malgajni monon?
A) En Sankt-Peterburgo. **B)** En Kusko. **C)** En Las Vegaso.
- Morgaŭ estos festo, kaj
A) ĝian temon estas somero. **B)** ĝia temo estas somero. **C)** ĝi temo estas somero.
- Mi havas **A)** amuza frato. **B)** amuzan fraton. **C)** amuza fraton.
- La lingvo de la inkaoj estas **A)** Esperanto. **B)** la dana. **C)** la keĉua.
- Mi kriis al ili: **A)** venus! **B)** venu! **C)** veno!
- En kiu urbo loĝas la familio de Zam grandparte?
A) En Meksikurbo. **B)** En Kaburbo. **C)** En Kusko.
- Mi ŝatas ŝin kaj **A)** ŝia frato. **B)** ŝian fraton. **C)** ŝia fraton.

9. Vin vidas **A)** min. **B)** mi. **C)** mia.

10. Se mi havus tempon, mi **A)** vizitu vin. **B)** vizitus vin. **C)** vizitis vin.

Vojaĝo dek ses (16) – Bonvenon al Irkucko

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 1 milionoj.
Ĉefaj lingvoj: La rusa.
Valuto: Rubloj.
Rimarko: Ĝi troviĝas ĉe Bajkalo,
la plej granda nesalakva lago en la mondo.
*It is situated on Lake Baikal,
the largest freshwater lake in the world.*
Lando: Rusio.



Vort-listo

atingi – to accomplish, to get, to reach, to attain	fero – iron
ĉarma – lovely, charming	kiel – as, like, how
demandi – to ask	kio – which, what; that, what
farti – to fare, to be doing, to feel	vojo – route, way, road

Teksto kun traduko

Irkucko estas grava centro en Siberio.

Irkutsk is an important centre in Siberia.

Vi eble demandas vin: “Kio estas Siberio?”

Maybe you’re wondering: “What is Siberia?”

Siberio estas vastega parto de la azia teritorio de Rusio.

Siberia is a vast part of the Asian territory of Russia.

Kiel oni povas atingi Irkuckon?

How can you reach Irkutsk?

Oni povas atingi ĝin per la transsiberia fervojo. Tiel multaj vojaĝas.

You can reach it by the Trans-Siberian Railroad. Many travel that way.

Zam ekvidas ĉarman rusinon kaj diras: “Saluton! Kio estas via nomo? Kiel vi fartas?”

Zam sees a charming Russian woman and says: “Hello! What is your name?

How are you?”



Notoj

Kio (what) is a question word and correlative.

Kiel (how) is a question word and correlative.

Tradukekzerco

- | | |
|---|---------|
| 1) What is your name? | = _____ |
| 2) How are you? | = _____ |
| 3) What is that? | = _____ |
| 4) I am not certain what will happen now. | = _____ |
| 5) How did you travel? | = _____ |

Plenigekzerco

Vortoj: *vin, de, fartas, per, grava, atingi*

Irkucko estas _____ centro en Siberio. Vi eble demandas _____ : “Kio estas Siberio?” Siberio estas vastega parto de la azia teritorio _____ Rusio. Kiel oni povas _____ Irkuckon? Oni povas atingi ĝin _____ la transsiberia fervojo. Tiel multaj vojaĝas. Zam ekvidas ĉarman rusinon kaj diras: “Saluton! Kio estas via nomo? Kiel vi _____?”

Vojaĝo dek sep (17) – Bonvenon al Kioto!

Loĝantoj:	Ĉirkaŭ 1,5 milionoj.
Ĉefaj lingvoj:	La japana.
Valuto:	Jeno.
Rimarko:	La kvara plej granda urbo en Japanio, kaj la plej granda nedetruita dum la Dua Mondmilito. <i>The fourth biggest city in Japan, and the largest that wasn't destroyed during the Second World War.</i>
Lando:	Japanio.



Vort-listo

freŝa – fresh, recent

gusto – taste

kia – what kind of, what sort of

kiom – how many, how much

koni – to be acquainted with, to know

kontenta – satisfied, contented, pleased

manĝi – to eat

peco – bit, piece

pri – concerning, about

proverbo – proverb

respondo – answer, reply

rizo – rice

tia – such, such a, that kind of

volvi – to wind, to wind up, to roll, to roll up

vorto – word

Teksto kun traduko

Kioto estas konata pro siaj bonaj manĝaĵoj.

Kyoto is known for its good foods.

Kia estas la manĝaĵo en Kioto? Ĝi estas freŝa kaj bongusta!

How is the food in Kyoto? It is fresh and tastes good!

Mi plej ŝatas suŝion, aŭ alivorte, japanajn rizvolvaĵojn.

I like sushi the most, or in other words, Japanese rice rolls.

Kiom da suŝi-pecoj mi povas manĝi?

How many pieces of sushi can I eat.

Tiom da pecoj kiom estas!

As many pieces as there are!

Kiom kontenta vi estas pri tia respondo?

How pleased are you with that kind of answer?

“Kia demando, tia respondo,” kiel diras la proverbo...

“Ask a silly question, get a silly answer,” as the proverb says...



Notoj

Kia (what kind of) is a question word and correlative.

Kiom (how much) is a question word and correlative.

Tradukekzerco

- 1) How is the weather today? = _____
- 2) How is the meal? = _____
- 3) How long will you stay? = _____
- 4) What a scandal! = _____
- 5) How old are you? = _____

Plenigekzerco

Vortoj: *kiom, povas, manĝaĵoj, ŝatas, respondo, kontenta, bongusta*

Kioto estas konata pro siaj bonaj _____. Kia estas la manĝaĵo en Kioto? Ĝi estas freŝa kaj _____! Mi plej _____ Suŝion, aŭ alivorte, japanajn rizvolvaĵojn. Kiom da Suŝi-pecoj mi _____ manĝi? Tiom da pecoj _____ estas! Kiom _____ vi estas pri tia respondo? “Kia demando, tia _____,” kiel diras la proverbo...

Vojaĝo dek ok (18) – Bonvenon al Nuko!

Loĝantoj:	Ĉirkaŭ 13 mil.
Ĉefaj lingvoj:	La gronlanda kaj la dana.
Valuto:	Danaj kronoj.
Rimarko:	Entute sur Gronlando loĝas nur 50 mil homoj. <i>A total of just 50 thousand people live on Greenland.</i>
Lando:	Gronlando.



Vort-listo

almenaŭ – at least	punkto – spot, point, dot, period
aparteni – to belong to	regno – state, realm
eble – maybe, perhaps, possibly	scii – to know, to know how
fakto – fact	stari – to stand
glacio – ice	sur – on, upon
insulo – island	tamen – nevertheless, but, yet, however
kies – which one's, of which, whose	urso – bear (animal)
mem – itself, herself, self, himself	zorgi – to worry, to care, to take care

Teksto kun traduko

Nuko estas la plej granda urbo sur la plej granda insulo de la mondo, Gronlando.

Nuuk is the largest city on the largest island in the world, Greenland.

Ĉu vi scias, kies estas Gronlando?

Do you know who owns Greenland?

Ĝi fakte estas parto de la dana regno.

It is actually part of the Danish state.

Tamen ekde la jaro 1979 Gronlando estas politike memstara.

However, since the year 1979, Greenland has been politically independent.

Ĉu Gronlando apartenas al Eŭropo? Ne, almenaŭ ne el geografia vidpunkto.

Does Greenland belong to Europe? No, at least not from a geographical viewpoint.

Ĉu la glaciursoj zorgas, kies estas Gronlando? Kredeble ne.

Do the polar bears care about who Greenland belongs to? Probably not.



Notoj

Kies (whose) is a question word and correlative.

Ĉu is a question word with which you create questions that are answered by **yes** or **no**. All you need to do is to take a statement and add **ĉu**, and it becomes a yes-or-no question. For example:

Ĉu la pomo estas bona (Is the apple good?) – **Jes, la pomo estas bona** (Yes, the apple is good).

Tradukekzerco

Whose idea was it? = _____
Do you understand? = _____
Really?! = _____
That woman, whose name I forgot, is very famous. = _____
OK for you? = _____


Plenigekzerco

Vortoj: *ĉu, kies, sur, ĝi, jaro, el, scias*

Nuko estas la plej granda urbo _____ la plej granda insulo de la mondo, Gronlando. Ĉu vi _____ kies estas Gronlando? _____ fakte estas parto de la dana regno. Tamen ekde la _____ 1979 Gronlando estas politike memstara. _____ Gronlando apartenas al Eŭropo? Ne, almenaŭ ne _____ geografia vidpunkto. Ĉu la glaciursoj zorgas _____ estas Gronlando? Kredeble ne.

Vojaĝo dek naŭ (19) - Bonvenon al Samarkando!

Loĝantoj: Ĉirkaŭ 400 mil.
Ĉefaj lingvoj: La uzbeka kaj la rusa.
Valuto: Somoj.
Lando: Uzbekio.



Vort-listo

aparte – separately, apart, particularly

civilizo – civilization

fondi – to establish, to found, to erect

iri – to go

jam – by now, already, yet

muzeo – museum

nova – new, novel

paco – peace

solidara – standing together

tra – through

Teksto kun traduko

Kiam fondiĝis Samarkando?

When was Samarkand founded?

Jam antaŭ 5 mil jaroj – ĝi estas unu el la plej malnovaj centroj de la monda civilizo.

It was already founded more than 5 thousand years ago – it is one of the oldest centers of world civilization.

Islamo venis al Samarkando en la oka jarcento, kiam araboj ekloĝis en la urbo.

Islam came to Samarkand in the eighth century, when Arabs began to live in the city.

Kial Samarkando estis grava dum tiom da jaroj?

Why was Samarkand important for so many years?

Ĉar tra ĝi iris la Granda Silka Vojo inter Eŭropo kaj Ĉinio.


Because the Great Silk Road between Europe and China passed through it.

Kaj kial Samarkando estas aparte interesa por esperantistoj?

And why is Samarkand especially interesting for Esperanto speakers?

Ĉar en ĝi esperantistoj fondis la Internacian Muzeon de Paco kaj Solidaro.

Because Esperanto speakers founded the International Museum of Peace and Solidarity in it.



Notoj

Kiam (when) is a question word and correlative.

Kial (why) is a question word and correlative. To answer a why-question, you use **ĉar** (because).

Tradukekzerco

When will you come?

= _____

Why do you live in that city?

= _____

Why didn't you come?

= _____

One day, when it's warm, we should go to the sea.

= _____

Why not?

= _____

Plenigekzerco

Vortoj: aparte, malnovaj, venis, fondis, ĉar, fondiĝis, dum

Kiam _____ Samarkando? Jam antaŭ 5 mil jaroj – ĝi estas unu el la plej _____ centroj de la monda civilizo. Islamo _____ al Samarkando en la oka jarcento, kiam araboj ekloĝis en la urbo. Kial Samarkando estis grava _____ tiom da jaroj? _____ tra ĝi iris la Granda Silka Vojo inter Eŭropo kaj Ĉinio. Kaj kial Samarkando estas _____ interesa por esperantistoj? Ĉar en ĝi esperantistoj _____ la Internacian Muzeon de Paco kaj Solidaro.

Vojaĝo dudek (20) – Bonvenon al Kilimanĝaro!

Ĉefaj lingvoj:	La svahila kaj la angla.
Valuto:	Tanzaniaj kaj kenjaj ŝilingoj.
Rimarko:	Monto, ne urbo.
Lando:	Tanzanio kaj Kenjo.



Vort-listo

afabla – affable, good-natured, friendly, kind

agi – to act

agrabla – nice, pleasant, agreeable, enjoyable

ajn – -ever, at all, -soever

aktiva – active

antaŭe – ahead, formerly, previously

migri – to hike, to migrate, to roam, to wander

monto – mountain

pinto – tip, summit, peak, point

trankvila – tranquil, calm

trejni – to coach, to train

Teksto kun traduko

Kie ni estas, vi jam scias: sur la pinto de Kilimanĝaro.

Where we are, you already know: on the peak of Kilimanjaro.

Kiu povas atingi la pinton, sur kiu ni nun estas?

Who can reach the peak that we're now on?

Tiuj, kiuj estas bone trejnitaj kaj ŝatas migregi.

Those who are well trained and like to hike a lot.

Fakte, ni nun staras sur loko, kie antaŭe estis aktiva vulkano.

In fact, we're now standing on a place where there used to be an active volcano.

Sed hodiaŭ Kilimanĝaro estas tute trankvila kaj afabla monto.

But today Kilimanjaro is an entirely calm and friendly mountain.

“Kiu agas afable, vivas agrable,” kiel diras la proverbo.

“A person who acts kindly has a pleasant life,” as the proverb says.

Kaj mi deziras al vi afablan kaj agrablan pluvojaĝon, kien ajn vi iros!

And I wish you a friendly and pleasant onward journey, wherever you go!



Notoj

Kie (where) is a question word and correlative.

Kiu (who/which) is a question word and correlative.

Tradukekzerco

Where are you? = _____
Where in the city do you live? = _____
Who is he? = _____
What city do you live in? = _____
Tomorrow I will be in that place, where you were yesterday.
= _____
Where are you from? = _____

Plenigekzerco

Vortoj: kiuj, pinton, ajn, de, aktiva, agas, hodiaŭ

Kie ni estas vi jam scias, sur la pinto _____ Kilimanĝaro. Kiu povas atingi la _____, sur kiu ni nun estas? Tiuj _____ estas bone trejnitaj kaj ŝatas migregi. Fakte, ni nun staras sur loko, kie antaŭe estis _____ vulkano. Sed _____ Kilimanĝaro estas tute trankvila kaj afabla monto. “Kiu _____ afable, vivas agrable” kiel diras la proverbo. Kaj mi deziras al vi afablan kaj agrablan pluvojaĝon, kien _____ vi iros!

Kvizo 4

1. Kiam vi volas manĝi? **A)** Bongustan suŝion. **B)** Post du horoj. **C)** Ĉar mi estas malsata.
2. Kiom da glaciursoj loĝas sur Gronlando? **A)** Jes. **B)** Ne. **C)** Multaj.
3. Kiu urbo fondiĝis antaŭ 5 mil jaroj? **A)** Samarkando. **B)** Kioto. **C)** Bruselo.
4. Ĉu vi konas ŝin? **A)** Jes, mi bone konas ŝin. **B)** Kial ne? **C)** Ĉu vere?
5. Kie estas Irkucko? **A)** Sur Gronlando. **B)** Urbo en Rusio. **C)** En Siberio.
6. Kies estas Esperanto?
A) Ĝi apartenas al tiuj, kiuj lernis ĝin. **B)** Ĝi apartenas al Zam. **C)** Nenies.
7. Kial vi faris tion? **A)** Kiel mi volis. **B)** Kiom mi volis. **C)** Ĉar mi volis.
8. Saluton! **A)** Kial vi fartas? **B)** Kiel vi fartas? **C)** Kie vi fartas?
9. Kio estas Kilimanĝaro?
A) Aktiva vulkano. **B)** Alta, trankvila kaj bela. **C)** Alta monto en Afriko.
10. Kia estas via nomo?
A) Mia nomo estas Zam. **B)** Esperu ĉiam! **C)** Mia nomo estas mallonga.

Respondoj de la ekzercoj kaj kvizoj

Vojaĝo 11

- 1) Ŝi vivas en granda urbo.
- 2) Eble ni venos morgaŭ.
- 3) Ili verŝajne vivas en bela domo.
- 4) Hodiaŭ ĝi funkcias, bonege!
- 5) Bedaŭrinde li malsaniĝis.
- 6) Ankaŭ vi estas tre bonvena.

Vojaĝo 12

- 1) Mi vidas la urbon.
- 2) Ŝi havas belan aŭton.
- 3) Hodiaŭ ni vizitos bonan amikon.
- 4) Morgaŭ bona amiko vizitos nin.

Vojaĝo 13

- 1) Tiu hundo estas lia.
- 2) Mi estas ŝia amiko.
- 3) Nia aŭto ne funkcias.
- 4) Ilia kato malaperis hieraŭ.

Vojaĝo 14

- 1) Pardonu min, mi tute forgesis tion.
- 2) Estus bonege se ŝi venus.
- 3) Donu la libron al mi, mi petas.
- 4) Venu tuj!
- 5) Se mi nur havus monon...

Vojaĝo 15

- 1) Laŭ mi estas tre bona ideo.
- 2) Liaj amikoj multe ridis. / La amikoj de li multe ridis.
- 3) Ŝi flugis de Pekino.
- 4) Li vojaĝos per trajno.
- 5) La libro de la vivo estas tre interesa.

Vojaĝo 16

- 1) Kio estas via nomo?
- 2) Kiel vi fartas?
- 3) Kio estas tio?
- 4) Mi ne certas kio okazos nun.

5) Kiel vi vojaĝis?

Vojaĝo 17

- 1) Kia estas la vetero hodiaŭ?
- 2) Kia estas la manĝo?
- 3) Kiom longe vi restos?
- 4) Kia skandalo!
- 5) Kiom aĝa vi estas? / Kiom da jaroj vi havas?

Vojaĝo 18

- 1) Kies ideo ĝi estis?
- 2) Ĉu vi komprenas?
- 3) Ĉu vere?!
- 4) Tiu virino, kies nomon mi forgesis, estas tre fama.
- 5) Ĉu en ordo por vi? / Ĉu enorde por vi?

Vojaĝo 19

- 1) Kiam vi venos?
- 2) Kial vi loĝas en tiu urbo?
- 3) Kial vi ne venis?
- 4) Unu tagon, kiam estos varme, ni iru al la maro.
- 5) Kial ne?

Vojaĝo 20

- 1) Kie vi estas?
- 2) Kie en la urbo vi loĝas?
- 3) Kiu li estas?
- 4) En kiu urbo vi loĝas?
- 5) Morgaŭ mi estos tie kie vi estis hieraŭ. / Tie kie vi estis hieraŭ, mi estos morgaŭ.
- 6) De kie vi estas?

Kvizo 3

- 1) A 2) C 3) B 4) B 5) C 6) B 7) A 8) B 9) B 10) B

Kvizo 4

- 1) B 2) C 3) A 4) A 5) C 6) A 7) C 8) B 9) C 10) C